

## Kara partoprenonto de la JES 2018!

Jam baldaŭ komenciĝos la 10-a Junulara E-Semajno! Ĉu vi jam antaŭĝojas same kiel ni?! Por via bona partopreno kaj alveno ni kolektis kelkajn gravajn informojn en tiu ĉi informilo.

## Alveno

JES komenciĝos la 28-an de decembro, kaj vi povas veni iam ajn dum la tago. Se vi volas alveni unu tagon pli frue, bonvolu kiel eble plej rapide skribu al ni ([jes.2018.storkow@gmail.com](mailto:jes.2018.storkow@gmail.com)), por ke ni povu mendi por vi liton kaj manĝojn kaj aktualigi vian kotizon. La 27-an de decembro eblas alveni ekde la 12-a horo.

### Kiel alveni?

Ĉi-jare la JES gastigo en la gastejo kaj renkontiĝejo "Hirschluch" (prononco: "Hirŝ-luĥ") en Storkow. La JES-ejo konsistas el kelkaj apartaj konstruaĵoj.

La adreso estas:

Hirschluch

15859 Storkow/ Mark

Jen la plej gravaj aferoj pri la alveneblaj. (Pli da informoj vi trovos en [tiu paĝo](#) kaj multe pli da detaloj cetere kolektis por vi Andi en [jena paĝo](#). Multan dankon, Andi!)

### De Berlino

Trovu konekton en [vbb.de](http://vbb.de) aŭ [bahn.de](http://bahn.de) ĝis Storkow aŭ alternative ĝis Fürstenwalde.


### De Storkow

Veturu per la buso 435 ([vbb.de](http://vbb.de)) ĝis la haltejo "Storkow, Hirschluch". Kosto: 1,50 EUR. Atentu ke la lasta buso de Storkow veturos jam je la 18h05!

### De Fürstenwalde

Veturu per la buso 435 ([vbb.de](http://vbb.de)) ĝis la haltejo "Storkow, Hirschluch". Kosto: 2,70 EUR. Atentu ke la lasta buso de Fürstenwalde veturos jam je la 18h26!

La vojo de la bushaltejo al la JES-ejo estas simpla kaj mallonga (5-8 minutoj piede), vidu en la mapo:



Ni tre tre rekomendas, se vi povas, ke vi alvenu sufiĉe frue por ankoraŭ povi alveni per buso!

Por tiuj, kiuj volas kune vojaĝi kaj alveni, daŭre eblas aliĝi al [karavanoj!](#)

## Kion fari post la lasta buso?

Piediri de la stacidomo Storkow ĝis la JES-ejo daŭras ĉirkaŭ 45 minutojn, jen la vojo en la mapo:



Per takso de Storkow:

Taksiveturo de la stacidomo Storkow al la ejo Hirschluch kostas proksimume 10 EUR, sed povas esti malfacile havebla vespere kaj nokte.

Taksiofirmao Bild: +49 33678 60557

Taksiofirmao Woite: +49 33678 72747

Per takso de Fürstenwalde:

Veturado kun takso de Fürstenwalde al la JES-ejo kostas proksimume 35-40 EUR.

Ankaŭ en Fürstenwalde povas esti malfacile ricevi taksion vespere/nokto.

Taksiofirmao FW-Taxi: +49 3361 377777

Taksiofirmao Fürstenwalder Spreefunktaxen: +49 3361 33333

Taksiofirmao Taxi Happy: +49 3361 303300

## JES-buseto

Krome, la 28-an vespere post la lasta publika buso ni provizos servon per **propra JES-buseto** (8 sidlokoj). Ĝi veturos unufoje hore ekde ĉirkaŭ la 19h00 de la stacidomo de Fürstenwalde ĝis la JES-ejo kaj la kotizo estas 3 EUR.

Atentu tamen ke 8 sidlokoj ne estas multe kaj unufoje hore ne estas ofte, do atendu ke vi eble devos atendi longe aŭ tamen devos preni taksion. Se vi volas havi informon pri nia JES-buseto telefonu *en tiu vespero* al: 0049 176 59 84 83 60.

Por nia buso ni ankoraŭ serĉas pliajn ŝoforojn. Se vi pretas helpi veturigi homojn al la JES (per nia buseto aŭ per alia aŭ propra aŭto), bonvolu kontakti nin. Multan dankon!

## Kion kunporti?

Krom ĉio kutima por viaj vojaĝoj, aparte pensu pri jenaj aferoj:

- **varmaj vestaĵoj** (Ĉapelo, koltuko, gantoj!)
- **propra taso**: estos bufedo kun senpaga teo kaj kafo - por ĝui varman trinkaĵon dum la tago kaj por eviti rubon, kunportu propran tason!
- **litotolaĵoj**: eblas liti litotolaĵojn en la ejo kontraŭ **4,50 EUR**. Se vi ne volas liti de la ejo, kunportu viajn proprajn. Atentu ke estas malpermesite uzi dormosakon en la lito!
- bantuko
- harsekigilo (se vi bezonas)
- rakedoj/batiloj por **tabloteniso** se vi volas ludi!
- **tabloludoj, kartludoj, puzloj**
- (se vi ne mendis manĝojn en la JES-ejo: eventuale **poto** aŭ/kaj aliaj kuiriloj (en la ejo estas kuirejetoj kun forneloj, fridujoj, akvoboligiloj kaj bazaj aferoj kiel glasoj, tasoj, teleroj, manĝilaro, ĉion alian eventuale bezonatan vi devas mem kunporti!)
- se vi elektis dormi en amasloĝejo: **dormosakon kaj matracon!**

## Kontribuu al la programo de JES!

Sabate vin atendas tradicia programero - la **trinko-manĝa nokto!** Partoprenantoj kunportas por tio specialaĵojn el siaj landoj. Ĉiu lando havos tablon por prezenti la kunportitajn aĵojn. Do kunportu vian kontribuon (ekzemple manĝeton, sukeraĵon/kukon/keksojn, trinkaĵon, alkoholaĵon, ktp.) por pliriĉigi tiun programeron!

Dum la tuta aranĝo funkcios ankaŭ **librointerŝanĝo!** Ĉu vi havas iujn **Esperanto-librojn** kiujn vi ne plu legos kaj kiuj ĉiuokaze nur subpolviĝas en via hejmo? Kunportu ilin al JES kaj donacu ilin al nia librokesto por ke aliaj Esperantistoj povu preni kaj legi ilin!

## Kion cetere gravas scii?

- surloke eblas pagi nur kontante nur **per eŭroj**. La plej proksima bankmaŝino estas en la urbocentro (vidu la mapon sube).
- **limigita interreto dum JES**: La situacio en la ĉi-jara JES-ejo estas ke ja ekzistas aliro al interreto en ĉiuj domoj, sed ĝi estas **limigita** laŭ kvanto de datenoj kaj **pagenda** (100 MB - 1 EUR). Tio signifas ke aferoj kiuj bezonas grandan datenkanton kiel videoj kaj simile eble ne funkcios tiom bone. Ĉiuokaze ni rekomendas dum tiu semajno retumi pli malmulte kaj anstataŭe uzi la tempon por ekkoni novajn homojn, partopreni diskutojn kaj ĝui la programon! :-) Ni tamen klopodas aldone provizi almenaŭ en 1 loko senpagan eblon retumi, sed ankaŭ ĝi ne estos ege rapida. Se vi kontribuas al la programo kaj bezonas interreton por via programero, kontaktu la organizantojn por ricevi kuponon!
- La **akceptejo** malfermiĝos **la 28-an je la 14-a horo** (se vi alvenas pli frue, vi havos iom da tempo por trinki tason da teo...)
- Hejmbestoj estas en tuta ejo malpermesitaj.
- En Germanio **dimanĉe** vendejoj kutime estas **fermitaj!** Same la 1-an de januaro (ŝtata festotago) ĉiuj vendejoj estos fermitaj!
- En la urbocentro vi trovos plej proksimajn vendejojn, apotekon ks, ili estas 20-30 minutojn piede for de la JES-ejo, eblas iri tien ankaŭ per buso (vidu la mapon sube).
- Post la 15-a de decembro ne plu eblas ŝanĝi manĝojn.

## Kio okazos dum JES?

Estos multaj aferoj kiuj okazos dum JES! Jen kelkaj aferoj kiujn vi povas antaŭĝoji:

- Esperanto-kurso por komencantoj
- Esperanto-kurso por progresantoj
- prelegoj
- [koncertoj kaj teatro](#)
- drinkejo
- diskejoj kun diversaj DĴoj
- gufujo
- libroservo
- kompreneble, silvestra balo la 31-an de decembro!

Antaŭ la aranĝo ni publikigos detalan horaron de la programo en nia retpaĝo. Tamen eĉ post tio ĝi povas iomete ŝanĝiĝi. La plej aktualan informon vi ĉiam trovos sur la programtabulo en la JES-ejo.

## Ekskursoj

Dum JES okazos diversaj ekskursoj: al varmbanejo, al Frankfurto ĉe Odro kaj al Berlino! Eksciu pli kaj aliĝu en [jena paĝo!](#)

## Kontaktoj

Ĝenerale ni petas vin kontakti nin retpoŝte al [jes.2018.storkow@gmail.com](mailto:jes.2018.storkow@gmail.com).

Tamen, en tre urĝaj kazoj dum via vojaĝado eblas ankaŭ telefone:

- 0049 176 59 84 83 60
- 0049 160 95 85 32 21

Trovu nin ankaŭ en [FB](#) kaj [Telegramo!](#)

Ni deziras al vi bonan vojaĝon kaj bonan alvenon! Ĝis tre baldaŭ en JES!

Elkore salutas,

via ĉi-jara JES-teamo -  
David, Lars, Michaela, Piotr, Roma kaj Sonja





# Urbocentro de Storkow

